

Federacio de la Junaj Eŭropaj Verduloj (FJEV / FYEG)

## **Komuna Manifesto**

por la elekto en la Eŭropan Parlamenton 2014

### **1. Sociala Eŭropo**

Por sociala Eŭropo cele al solidareco kaj kontraŭ maljusta ŝparema politiko !

Eŭropo aktuale alfrontas la sekvojn de difekta ekonomia kaj socia modelo kun neregulataj financaj merkatoj, senkontrola banka sistemo kaj superregado de privata profito super publika bonfarto. Ĝis nun la sola respondo estis la efektivigo de maljustaj kaj detruaj elspezreduktaj rimedoj, pro kio homoj kaj la ekonomio suferas. Ni ne povas savi la bankojn kaj aliflanke ignori la multe pli urĝan financon savaranĝon, kiun postulas la sociaj vivkondiĉoj de eŭropaj civitanoj! Unu el la plej grandaj malsukcesoj de Eŭropo hodiaŭ estas la grandega procento de senlaboreco ĉe gejunuloj en multaj EU-membro-landoj. Sur la Eŭropa nivelo FJEV defendas la Junularan Garantion. Tamen, ĉi tiu Junulara Garantio ne sufiĉas. Ni devas pritrakti la fundamentajn kaŭzojn de la grandega procento da senlaboreco, kiuj troveblas kaj en la severaj elspezreduktaj rimedoj kaj en la sisteme malstabila kaj malutila ekonomia modelo.

La eŭropa unuiĝo devenas de la homoj en Eŭropo, kiuj subtenas unuj la aliajn. La ignoro de la baza principo de eŭropa solidareco kaj de la komuna sociala asekuro ludas centran rolo en la aktualaj krizoj. Fronte al larĝiĝanta diferenco inter la riĉuloj kaj malriĉuloj en Eŭropo, ne sufiĉas ekagi sur nacia nivelo. Hodiaŭ, vetkuro malsupren al malaltaj salajroj, impostoj kaj sociaj vivkondiĉoj troviĝas inter la EU-membroŝtatoj.

FJEV subtenas komunan bon-kvalitan laboro-leĝaron. Dungiteco estas baza rajto, ne privilegio; lukti kontraŭ senlaboreco, speciale inter junularo, kaj krome ankaŭ garantii bonkvalitajn laborpostenojn, devus esti alta prioritato en la EU. Sociala Eŭropo bezonas komunajn minimumajn sociajn vivkondiĉojn, kiel minimuma salajro, malaltekostaj luprezoj kaj la rajto de kvalitaj kaj senpagaj sanzorgo kaj edukado, tamen ne nur la plejeble malalta kompromiso. Ni bezonas vojmapon al sociala Eŭropo montrantan kaj mallongatempan aranĝojn kaj longtempajn celojn. Imposto-oazoj, imposto reduktado kaj ĉia imposto-konkurenco inter landoj devas esti haltigitaj. Por akiri veran ekonomian unuiĝon, unuigita fiska sistemo kun komunaj imposto-normoj necesas en la EU. Ankaŭ la banka sistemo bezonas profundan reformon: FJEV postulas efikan reguligon de la eŭropa banka sektoro. Alt-riskaj financaj posedaĵoj kaj aktivecoj devas esti malpermesataj por redukti malstabiligan spekuladon.

Ni devas kontraŭbatali la fundamentajn kaŭzojn de la grandega senlaboreco, kiuj troveblas kaj en la severaj elspezreduktaj rimedoj kaj en la sisteme malstabila kaj malutila ekonomia modelo.

### **FJEV postulas:**

1. Haltigu rigoran elspezreduktan politikon tuj.

Ĝi frapas plej forte tiujn en senŝirmaj pozicioj (kiel junuloj, maljunuloj, senlaboruloj, precipe virinoj, aŭ enmigrintoj), estas maljusta, difektas la ekonomion kaj devigas la civitanojn suferi porti la sekvojn de kompania avareco kaj manko da respondeco. Necesas civitana revizio de ŝtatŝuldo por konstati kiuj partoj estas kontraŭleĝaj kun rifuzo repagi tiun parton. FJEV celas alternativan modelon por la eŭropa ekonomio kaj proponas alternativajn instrumentojn por pritrakti la multoblajn krizojn. Ni volas Eŭropon de solidareco, kie tiuj, kiuj posedas pli kaj profitas pli pro siaj privilegiaj pozicioj, ankaŭ kotizas pli por la komuna bono. Ni volas alian Eŭropon bazitan sur solidareco, kie bankoj ne povas ĉantaĝi registarojn; kaj ni kontraŭas ĉi tiun Eŭropon, kie profitoj estas privatigitaj, dum kontraste perdoj estas socialigitaj. FJEV postulas verdan transiron al justa, egaleca kaj sociale daŭripova ekonomio.

2. Ekonomia solidareco pere de verda kaj progresiva fiska unio.

Ĉi tiel la Eŭropa Parlamento povus decidi kiel administri la eŭropan impostojn. Ni defendas altajn impostojn pri la difekto de la naturo kaj uzo de resursoj, kaj protekton de homoj kun la plej malaltaj enspezoj. Ni postulas ekonomion kie ekologiemo ne estas lukso - kaj la ekologian transiron financu tiuj, kiuj povas pagi la kostojn. Ni batalas kontraŭ imposta fraŭdo kreante eŭropan fiskan aŭtoritaton.

Ni batalas kontraŭ imposto-oazoj, imposto-reduktado kaj ĉia imposto-konkurenco inter landoj, kio inkluzivas meti tuteŭropajn minimumajn impostojn kiel kompania imposto kaj imposto pro grandaj riĉaĵoj kaj heredaĵoj. Cetere la EU bezonas komunan kompanian imposto-bazon, kun la samaj profit-impostigaj reguloj por ĉiuj firmaoj. Ĉi tiuj rimedoj estas necesaj por efektiviigi solidarecon en la EU postulante justan kontribuon de la pagipovuloj por kovri la koston de la financado de eŭropa socia modelo, kiu reduktas la diferencojn inter ĉi tiuj firmaoj kaj tiuj kiuj estas trafitaj de la efikoj de la ekonomia sistemo.

3. Ni devas protekti laboristajn rajtojn tra la tuta EU:

alt-nivelaj komunaj minimumaj laborkondiĉoj, salajroj kaj sekureco-normoj por dungado devas esti establataj ĉe la EU-nivelo por protekti la laborantaron kontraŭ ekspluato favore al la "konkurencivo" de la lando. Havigi pli fortan voĉon por sindikatoj kaj laboristaj reprezentantoj, donante al ili veran gravecon kaj ene de firmaoj kaj en politika decidofarado.

Fondado de entreprenoj kaj kooperativoj en la manoj de laboristoj, kaj kooperativigo (la konvertado de firmaoj en kooperativojn) devas esti subtenata kaj faciligita de favoraj laŭleĝaj kondiĉoj.

4. Inversigu la aktualan tendencon redukti publikajn servojn kaj ties sistemecan privatigon - kio montriĝis esti fiska kaj homa katastrofo - kaj ni subtenas ŝtatan kaj regionan investon en fundamentaj publikaj servoj kiel edukado, sano, loĝado, socialaj servoj aŭ programoj por la unua-posteno, por kombini efikecon kun bon-kvalitaj publikaj servoj kaj por akceli dungitecon. Ni subtenas la postulon, ke publikaj servoj kiel akvo, energio, transportado, rubo-traktado, poŝto-servoj kaj komunikado devas esti revenigataj en publikan proprieton kaj/aŭ oni devas prioritati kooperativojn kaj sociajn entreprenojn.

5. La EU faru esplorojn kaj konkretajn paŝojn por realigi planojn redistribui riĉecon. Tiu rezultigu tuteŭropan bazan enspezon kaj maksimuman salajron, ne forigante nunajn socialajn bonojn, sed estante aldonaj rimedoj. Ni postulas la abolicion de gratifikoj favore al pli vasta uzado de strukturaj fondusoj por financi rimedojn kiel senlaboreco-asekuro, gepatra-subsidio, pensioj, publika sanzorgo kaj novstilaj socialaj investoj (kunvivado, agrikulturaj kooperativoj...).

EU-vasta baza enspezo estas ne nur ilo por plia fiska kaj ekonomia sendependeco sed antaŭ ĉio rimedo por havigi al neglektitaj sociaj grupoj dignan vivon. Baza enspezo ankaŭ estas rimedo por transiro direkte al vera hom-centrita ekonomio, kie la bezonoj de la homoj estas ĉe la kerno de netruda ekonomia sistemo.

6. Reformi la bank-sistemon.

Ekzemple, la ECB devas fariĝi demokratie regata ŝtata banko, kun la permeso pruntedoni monon rekte al la Membroŝtatoj aŭ la Eŭropa Komisiono.

Podetala uzado de bankaj servoj estu apartigita de riska investado, kaj la grandeco kaj maksimumaj ŝuldo-niveletoj por bankoj estu limigitaj, por eviti ke ili fariĝos "tro grandaj por rompiĝi". La banka sistemo bezonas profundan reformon por redirekti kapitalon for de spekulado kaj toksaj financaj produktoj, al socia entreprenemo, kooperativoj kaj financado de la ekologia transiro, kun rimedoj kiel la Financo-Transakcia Imposto kaj antaŭenigo de kooperativaj, ekologiaj kaj sociale afablaj bankoj.

Cetere, akciuloj kaj investantoj devus esti respondecaj proporcie al la amplekso de siaj investoj, okaze de nesolventeco de banko aŭ firmao, anstataŭ ricevi krizan kompenson el mono de impostpagantoj. Aldone FJEV pledas por vera bank-unio, respondeca inter alie por efika banko-savo okaze de nesolventeco. Malkaŝemo kaj respondecigaj rezultoj estas decide gravaj por restaŭri konfidon al la banko-sektoro.

7. La rajto de loĝejo devas esti certigata en la EU. Necesas EU-vasta investado en malal-

tekosta kaj sociala loĝado, ebligante al gejunuloj pli bonan moviĝeblon kaj sekurecon, kaj pli bone inkluzivante homojn de malsamaj fonoj. Necesas ankaŭ starigi laŭleĝan subteno-kadron por familioj kiuj ne povas bonteni sian nhipoteka krediton por sia unua hejmo kaj deklari ilian eldomigon kontraŭleĝa.

8. Nova eŭropa sistemo de edukado taŭga por la 21a jarcento:

pliiigi investadon en edukado kaj evoluigi emancipan komprenon de edukado, povigi la junularon prefere ol krei serio-dungitojn, kaj subteni neformalan edukadon, interkulturan lernadon, kaj edukado pri homaj rajtoj kaj civitaneco.

La instruplano de membro-ŝtataj sistemoj de edukado povu provizi similajn nivelojn de diverseco kaj specialig, havu komunan eŭropan elementon kaj estu plene agnoskita en la cetera EU.

Reformi la Eŭropan Sistemon de Poento-Transigo kaj -Akumuligo (angle: ECTS) por fari ĝin pli fleksebla kaj malpli restriкта, kaj garantii la eblecon ŝanĝi universitatojn. Sistemo kiu donas spacon por individuaj elektoj, ebligas moviĝadeblon de studentoj. Oni ankaŭ stimulu interkulturajn interŝanĝojn.

La ŝancoj kiujn donas la programo Erasmus devas esti plibonigitaj per pli da stud-lokoj kaj aplikeblaj temaroj por permesi al gejunuloj sperti Eŭropon propraokule. Ili devas esti pli alireblaj por civitanoj el malpli favoraj sociaj fonoj, vastigitaj al metilernadoj kaj proponi pliaj ŝancoj al junaj entreprenistoj.

9. Prioritatigi batalon kontraŭ junulara senlaboreco EU-nivele.

Kiel provizora rimedo ĝis vera sistem-ŝanĝo estos atingita la Junulara Garantio devas esti plifortigita per asignoj de minimume 8 miliardoj da eŭroj jare. Necesas certigi haveblecon de formala dungado, pagata metilernado aŭ ebloj de trejniĝo por gejunuloj, ne nur en iliaj deveno-landoj sed en la tuta Eŭropo. Junulara entreprenemo - socialaj kaj daŭripovaj entreprenoj kaj kooperativoj - bezonas esti subtenata kaj plifortigata.

10. Antaŭenigi krei laborlokojn puŝante la ekonomion al socia kaj ekologia transiro.

Ĉi tion eblas atingi pere de investado en verdaj sektoroj kiel renovigebla energio, karbon-efikaj moviĝado, transporto kaj infrastrukturo, esplorado kaj edukado, evoluigado, publikaj servoj kaj loĝado. Ankaŭ et-skala ekonomio kaj loka produktado devus esti subtenataj por antaŭenigi energio-efikecon kaj trovi vojojn al pliigita sufiĉeco. Laborhoroj devas esti reduktitaj por distribui laboron pli egalece. Ŝtata subteno ne devus esti direktata al transnaciaj konzernoj, sed al malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj. Restrukturado de nia ekonomio estas decide grava por estigi pli egalecan, socialan kaj ekologian Eŭropon.

11. Superi la ideon de ekonomia kresko kiel la ĉefa ekonomia celo de ekonomia politiko. Estas nek la Malneta Enlanda Produkto, nek la Maastricht- Kriterioj de "3% deficino", kiu

diras al ni ion pri la bonfarto de la popolo, la stato de la medio aŭ la justa divido da tempo kaj riĉeco en socio. Sekve FJEV postulas malakcepti ĉi tiujn indikilojn kiel orientiĝo-faktoroj por politikaj decidoj. Ni volas pli socialan, egalan kaj ekologian socion kaj ne ajnajn nombrojn - alternativaj indikiloj kiel la GINI koeficiento povas helpi nin eltrovi malegalecojn sed ne devus esti dogma kredo.

## **2. Demokratia Eŭropo**

La kapablo de eŭropaj institucioj kaj ties decidofara arkitekturo por esti demokratia kaj partopreniga determinos la estontecon de la eŭropa projekto. Por ĉiu komuna politika institucio estas esenca fido je la interagoj de homoj en kaj kun la institucioj. La sistemo de EU, kun ties manko de travideblo kaj eta povo por senpere elektitaj organizaĵoj, ĝis nun ne kapablis esti tiun fidon - jen kial ni bezonas esencajn ŝanĝojn en la sistemo de la EU-aj institucioj por bazigi EU-on sur demokratiaj partopreno kaj respondeco. Eŭropo estas ankoraŭ perceptata kiel projekto de elitoj. FJEV volas igi ĝin projekto por la homoj vivantaj en Eŭropo.

FJEV postulas realan demokration nun. Sen certigo de fortaj civitanaj rajtoj pere de multampleksa aliro al informoj en kaj ekster la reto, senpaga kaj altkvalita edukado, efektivigo de ciferecaj rajtoj, minoritataj rajtoj, liberaj parolado kaj amaskomunikiloj, vigla civila socio, respondecaj kaj travideblaj institucioj kaj aktivaj civitanoj, kiuj sentas sin povigitaj por esti partoprenantoj en debatoj kaj decidoj, socio neniam povas krei etoson de egaleco, solidareco kaj inkluziviteco.

FJEV kredas, ke Eŭropo povos solvi la eŭropajn krizon nur, se ĝi kuraĝos superi siajn strukturajn demokratiajn defecitojn kaj pli bone inkluzivos sian civitanaron, limigos la povon de premgrupoj, devontigos homojn al rekta partoprenado en decidado, ekzemple pere de Eŭropa Civitana Iniciato, kaj faros decidojn je la laŭeble plej malalta nivelo, kaj ankaŭ enkondukos la principon de demokratio en entreprenojn kaj en la edukan sistemon. Ni bezonas tuteuropean diskuton pri la demokratia renovigo ne nur de Eŭropa Unio. Tio efikos sur politikaj institucioj kaj profitigos ĉiujn partojn de la socio, inkluzive de la ekonomia sektoro kun plia kontrolo de bankoj, forta laborista reprezentado kaj pli da kunlaboraj negocoj.

### **FJEV postulas:**

1. Decidofaraj procesoj estu malfermitaj, travideblaj, kaj partoprenigaj.

Ni bezonas demokratiigi ĉiujn nivelojn de la socio, inkluzive de publikaj institucioj, lernejoj, universitatoj, bankoj, kulturaj institucioj kaj entreprenoj. Ĉiuj ĉefaj regaj kaj reprezentantaj postenoj de publikaj institucioj estu demokrate elektitaj, inkluzive de ŝtatestroj. Decidofarado je ĉiuj niveloj ebligu al homoj partoprenadon, inkludante la malfermon de

la parlamenta procedo, la provizon de cifereca partopreno kaj konsultaj mekanismoj kaj rektaj demokratiaj iloj, kiaj popolaj leĝdonaj iniciatoj, devigaj referendumoj kaj lokaj partoprenigaj programoj.

Decidofaradaj procesoj estu travideblaj. La gravaj dokumentaroj kaj politikaj malnetaj konceptoj de EU-aj institucioj estu publike haveblaj. Kaze de risko pri individua integreco aŭ publika sekureco, tribunaloj decidu, kiuj partoj povas esti publikigataj. Por limigi la influon de grandaj korporacioj en la demokratiaj decidofaraj procesoj, ĉiuj decidofarantoj publike malkaŝu, kiun ili renkontas kaj kiom ofte. Ni bezonas kontraŭi la altajn nivelojn de politika korupteco.

Leĝaro kaj ĝia efiko sur diversaj sociaj grupoj estu konfirmitaj en partopreniga proceso kun taŭga reprezento de aŭtoritatoj kaj la koncernitaj grupoj, inkluzive de etnaj minoritatoj.

Demokratio bezonas informitan socion, kiu estas konscia pri siaj rajtoj, kaj kie homoj preta kaj kapabla por preni respondecon unu por ĉiu alia.

2. Efektivigi kaj certigi la principon de konvena aŭtonomeco:

decidoj estu farataj en la laŭeble plej malalta nivelo, kondiĉe ke tio estas la plej efika agonivelo.

3. Ni bezonas institucian reformon de EU:

La Eŭropa Parlamento estas nuntempe la ununura EUa institucio rekte elektita de la civitanoj. Tial la Eŭropa Parlamento kune

kun dua Ĉambro havu la leĝdonan povon je la EUa nivelo. La Eŭropa Parlamento havu la rajton elekti kaj eksigi individuajn membrojn de la EUa Komisiono kaj havu la voĉdonan rajton pri ĉiuj diversaj EUaj buĝetaj temoj.

La Konsilio, kiu aktuale reprezentas registarojn de membroŝtatoj, fariĝu vera, elektita Dua Ĉambro kundecidanta kun la Parlamento kaj reprezentanta la regionan kaj nacian diversecon de Eŭropo. Ĝi ankaŭ ebligu, ke malgrandaj landoj havas voĉon kaj ludas gravan rolon en la demokratia proceso.

La Komisiono estu demokratie respondeca pri tio, ke ĝi ne estu konsistigita de naciaj reprezentantoj, kaj ricevu du-trionan voĉdonitan konfidon de la Eŭropa Parlamento.

4. Tuteŭropaj transnaciaj listoj:

50% de seĝoj de la Eŭropa Parlamento estu asignitaj al tuteŭropaj transnaciaj listoj, kun enira sojlo de 3% de la voĉoj.

5. Strebi al malaltigo de la voĉdonrajta aĝo:

La voĉdonrajta aĝo estu reduktita en ĉiu membroŝtato, komencante ĉe voĉdonrajta aĝo de 16 jaroj ĉe la voĉdonado por la Eŭropa Parlamento.

6. FJEV apogas la rajton je memdispono de eŭropaj popoloj, kiaj la frisa, la skota, la kataluna kaj eŭska pri referendumaj procesoj, kaj la Nord-Irlanda pacproceso.

7. FJEV volas plifortigi Eŭropan Civitanan Iniciaton (ECI):

Tie estas multaj ebloj por plibonigo. ECI estu pli bone antaŭenigata por certigi plenan konsciiĝon ĉe civitanoj pri tiu ilo por partopreniga demokratio; krome la kolektado de subskriboj kaj aliaj burokrataj procesoj bezonas simpligon. ECI estu devigata - kio signifas, ke la parlamento ĉiam devos redakti leĝoproponon post sukcesa ECI, kaj civitanoj havu la oportunon por tuteŭropa referendumo pri ĝi.

8. Nova konstitucia kongreso (Konvencio) pri la estonteco de Eŭropo:

Nova, malfermita, travidebla kaj inkluziva Eŭropa Konvencio estas la rimedoj por demokratie reformi la institucian bazon de EU kaj proponi komunan vizion por la estonteco de la Unio. Tiu Konvencio estu malfermata al la civitana socio kaj civitanaj proponoj, funkciu surbaze de malfermitaj renkontiĝoj, kaj povu demokratie decidi kadre de la reformoj kaj la elirejo el la ekonomia, financa, ekologia kaj socia krizoj en Eŭropo, kaj konsideru la bezonojn de minoritatoj.

En la konvencia proceso FJEV pledas por federacia Eŭropo, kiu estas finance sendependa de la membroŝtatoj. La Konvencio rezultigu novan konstitucion ratifikitan de tut-EUa referendumo.

9. Sekura, libera kaj malfermita reto:

Aliro al la interreto kiel baza homa rajto bezonas protekton. Malfermita kaj neŭtrala reto ludas ŝlosilan rolon en la procesoj de publika debatado kaj demokratiaj ŝanĝoj. Specifaj rimedoj de cifereca partopreno en politikaj procesoj estu antaŭenigataj; sekureco de personaj informoj kaj libereco esprimi sin, inkluzive de la protektado de denunciintoj estu garantiata, kaj malfermitaj permesiloj precipe en la publika administrado estu antaŭenigataj.

10. FJEV postulas, ke la EU ratifu la eŭropan konvencion pri Homaj Rajtoj kaj liberecoj.

11. EU havas klaran internacian respondecon pri konfliktoj:

EU enfokusigu al prevento de konfliktoj, ĉesigu eksporton kaj produktadon de armiloj, mallegiĝu nukleajn armilojn, forte agu kontraŭ internacia armila komercado kaj elprovu ĉiujn ne-militajn rimedojn kaj manierojn por preventi pliiĝon de konflikto, ĉiam konsiderante la landan tutecan soci-politikan kuntekston.

Tuj post konflikto, EU ludu fortan rolon en pacestigaj kaj packonservaj procesoj kaj en la rekonstruado de socioj. Tio necesigos inkluzivon de Homaj Rajtoj kaj edukado pri paco

por ĉiuj. Ankaŭ necesas certigi, ke ĉiuj flankenŝovitaj grupoj, inkluzive de virinoj kaj junuloj, estu rajtigataj havi pivotan rolon en tiu proceso.

Disvolva kunlaborado estu kunordigata je EUa nivelo. Ĝi koncentriĝu je lokaj organizaĵoj kaj strebu al vera posedo de projektoj kaj procesoj de la popolo mem. Multnaciaj korporacioj ne havu influon sur tiuj procesoj de kunlaborado. Tutmonda solidareca laboro ne povu esti uzata kiel "Troja ĉevalo" por nov-kolonialismo.

Gravas antaŭenigi la komprenon, ke tutmonda malegaleco estas kaŭzita de maljusta kaj maldemokratia internacia sistemo, kaj ke la ĉefa politiko por fini la tutmondan malriĉecon koncentriĝu al politikaj sektoroj ekster la formala evoluiga sektoro, kiuj inkluzivas internacian komercadon, agrikulturajn subvenciojn, kaj internacian kunlaboradon pri impostaj temoj. NATO estas netravidebla kaj maldemokratia postrestaĵo de la malvarma milito kaj estigas neniun respondon al aktualaj tutmondaj malsekurecoj. Tial ĝi estu forigata.

Neniu armeo, neniu milito. EUa militistaro, ne armeo, povas esti formata kiel nedezirata provizora sed necesa defendo-mekanismo por estigi lokan sekurecon al eŭropanoj. Ajnaj longdaŭraj imperiismaj armeaj rimedoj kaj armiloj estu forigataj kaj ne konservataj, eĉ pretekste de defendaj bezonoj. UN estu institucio sen armeo kaj ĝiaj decidoj estu prentaj laŭ tre demokratia maniero kaj ili superu ajnajn naciajn decidojn.

UN uzu por trakti konfliktojn en la mondo nur diplomaciajn, juĝistarajn kaj ekonomiajn rimedojn aliajn ol blokadojn de vivnecesaj produktoj. Devigataj militaj servoj estu forigataj. Ke militservo ne estu devigata, estu kriterio por aliĝo de kandidataj landoj al Eŭropa Unio.

### **3. Genro kaj LGTTP+**

(LGTTP = Lesbinoj, gejoj, transgenruloj kaj transseksuloj, poliamoruloj kaj ĉiuj aliaj, kiuj ne mezuriĝas laŭ la dominaj normoj pri sekso kaj genro)

Frakasu patriarkion – ĝi ne frakasos sin mem.

FYEG estas feminisma organizaĵo ĉar ni identigas patriarkion kiel matricon de valoroj, kiuj estas diskriminaciaj kaj violentaj kontraŭ virinoj, LGTTP+-homoj, sociale handikapitaj homoj kaj migruloj.

Pro tio FYEG postulas:

1. Devas finiĝi diskriminaciado surbaze de sekso, genro, seksa orientiĝo kaj genroidentiĝo.

Kontraŭ-diskriminaciaj leĝoj kun konkretaj rimedoj, programoj kaj efikaj punoj estu en-



kondukataj kaj efektividataj en membroŝtatoj kaj nivele de la EU. Oni aparte atentigu kontrŭbatali intersekcian diskriminacion kiaj duobla diskriminacion surbaze de etneco kaj/aŭ raso, genro, genroidentiĝoj kaj/aŭ seksa orientiĝo de homoj.

2. Malamo-krimoj kaj perforto surbaze de sekso, genro, seksa orientiĝo aŭ genroidentiĝo estu registrataj en krimokodeksoj kaj tiaj krimoj ne restu sen puno.

Kortumaj procesoj estu sensivaj kaj ne permesu spacon por duobla diskriminacio kaj la viktimo den la supervivuloj de tiaj krimoj. La ŝtato kaj ties reprezentantoj neniam toleru ajnajn agojn de perforto faritaj pro homofobio, transfobio, mizoginio, rasismo aŭ ajna alia grupo-rilata mizantropio kaj sendu fortajn mesaĝojn pri tio al la publiko.

3. Konkretaj rimedoj estu aplikataj por batali la sub-reprezentadon den virinoj en politiko kaj ekonomio por garantii certan proporcio de sidlokoj, okupataj de virinoj en la parlamento, korporaciaj estraroj, registaro kaj aliaj niveloj de politika kaj socia vivo.

Kvotoj en si mem ne forigas la bazan kaŭzon de genra neegaleco, sed estas nepra paŝo por superi la vire dominataj sferoj de politiko kaj ekonomio. Ili defias patriarkiajn normojn kaj povas liveri diferencajn rolomodelojn. Tiaj kvotoj devas esti realigataj samtempe kun programoj kaj kampanjoj por progresigi genroegalecon en ĉiuj sociaj sferoj. Por superi la tre signifan genran salajro-diferencon oni devas trakti diversajn problemojn. Unu el tiuj estus sankcii kompaniojn, kiuj ne povas pravigi pro kio ili pagas pli malgrandajn salajrojn al virinoj ol al viroj en samaj pozicioj. Alia estus socia retaksado den tiuj laboroj, ĉefe faritaj de virinoj, kiel prizorga laboro, kie oni devas altiĝi la salajrojn. La grandega amaso de nepagata hejmlaboro devas esti kalkulata same valora kiel salajro-dependa laboro en oficejoj aŭ fabrikoj.

4. Sekurigi la elektopovon inter familio kaj laboro por ĉiuj EU-civitanoj, sendepende de genro.

Pri-zorgadi infanojn estu egale distribuata en familioj, aranĝante gepatran foreston (de la laborloko) laŭ la 6+6+6-modelo, laŭ kiu ĉiu de la gepatroj ricevas forestoperiodon de ses monatoj kaj la restantaj ses monatoj estas libere dividataj inter la du. Egalaj modeloj devas esti trovataj por akomodi la diversecon de nuntempaj familioj – la sama subteno devas esti aplikata al tiuj, kiuj deiris de la 'tradicia' patrino-patro-infano-modelo de la familio. Provizi ekonomian subtenon por familioj rilate infanprizorgadon kaj senkostajn infanvartejojn kaj infanĝardenojn estu haveblaj por ĉiu infano en la EU ĝis la jaro 2020. Dungantoj kaj EU-fondusoj devas kontribui al la gepatra foresto kaj ekonomia subteno.

5. Rajtoj pri reproduktado devas esti garantiataj por ĉiuj homoj en Eŭropo.

Seksa kaj reproduktiĝa sano estu plibonigata kaj promociata per edukaj programoj en lernejoj kaj por ĉiuj kiuj demandas pri ili. Senkostaj kaj libere haveblaj kontraŭkoncipiloj

provizendas.

La rajto pri aborto devas esti certigata kaj pagata de la publika sanservo. La ŝtataj kaj religiaj normoj ne konfliktige sin intermetu al la suverenco de la virinoj pri sia korpo, sekseco kaj reproduktado.

6. Ni postulas Genro-Buĝetadon kadre de la EU-buĝeto.

Ĉiuj buĝetorilataj decidoj devas esti antaŭkontrolataj koncerne siajn potencialajn efikojn koncerne genrojn. Aldone necesas posta profunda valorigo de la buĝetado.

7. Oponas subpremajn politikojn koncerne LGTTP+-homoj ene kaj ekstere de la EU, kunlaborante kun organizaĵoj pri Homaj Rajtoj kiel la Konsilio de Eŭropo samkiel kun lokaj kaj regionaj NROj.

Ni postulas fortajn diplomaciajn paŝojn kontraŭ nacioj, kiuj kontraŭas al LGTTP+-homoj per sankcioj de subpremaj registaroj, kiuj punadas kaj persekutas civitanojn surbaze de ties genra identiĝo aŭ seksa orientiĝo, aŭ plenan embarĝon kontraŭ nacioj, kiuj punas LGTTP+-homojn per mortopuno. Ni postulas la kombinon de diplomaciaj sankcioj kaj projekto-politikon por subtenado den LGTTP+-homoj, aparte en Orienta Eŭropo. Devas esti ebligata politika azilo por LGTTP+-aktivistoj kaj -homoj, persekutataj de LGTTP+-malamikaj registaroj.

8. Ni devas superi genrajn binarojn.

Akceptado kaj promociado den genra diverseco devas esti progresata; kaj devas provizi la necesan infrastrukturon, finanacan subtenon kaj eblecon por rajtiĝado. La dunorma diŝtomio, kiu devigas homojn identiĝi aŭ vire aŭ virine, devas esti transcendata. Kiel unua paŝo en la identiga dokumento la opcio por tria genro devas esti aldonata. Pli poste la kategorio "genro" en identiga dokumento fine ne plu estu deviga.

La binara genrosistemo de niaj socioj kausas profundajn problemojn, ekz. por interseksaj homoj. La socio kaj la juro devas agnoski, ke ekzistas pli ol du genroj. Interseksaj homoj ne estu perfortataj submetiĝi al operacioj. Operacioj per perforto punendas.

9. Ni postulas egalrajtan geedziĝon kaj egalan rajton pri familia vivo:

Edziĝoleĝoj en ĉiuj EU-membroŝtatoj estu farataj genroneŭtralaj. Intertempe ĉiuj EU-membroŝtatoj akceptu edziĝojn de ĉiuj aliaj membroŝtatoj kaj garantiu la eblecon je samseksa edziĝo en aliaj nacioj por homoj vivantaj en nacioj, kie tiu aktuale ne estas agnoskata.

Ne ekzistas favorata tipo de interrilateco. Pro tio FYEG postulas, ke ĉiuj privilegioj kaj specialaj rajtoj de edziĝintaj partneroj estu aboliciataj. Necesas garantii adoptorajtojn por ĉiuj formoj de partnerecoj kaj familioj.

Devigataj testoj por ajna individuo pri HIV / Aidoso aŭ aliaj sekse akiritaj malsanoj estu

malpermesataj. Ni ankaŭ postulas, ke transindividuoj ricevas adekvatan protektion kontraŭ la nuntempaj praktikoj, kiuj postulas, ke post-transigaj individuoj estu steriligataj.

10. Edukoinstitucioj kiel lernejoj daŭrigas heteronormalecon baze de ĉiutaga vivo kaj kontribuas al heteroseksecio, agnoskata kiel la eterne valida formo de seksecio. Ĝenerale la edukado en Eŭropo devas sensiviĝi por demandoj pri genro, seksa orientiĝado kaj genra identiĝado. Seksa edukado en lernejoj estu inklusiva kontraŭ genra diverseco, batalu kontraŭ genraj stereotipoj, homofobio kaj transfobio kaj promociu respekton kontraŭ LGTTP+-familioj, sed ne kiel parto de religia edukado.

Garantui, ke temoj de LGTTP+, de feminista kaj pluramora teorio kaj historio estas parto de la lerneja kaj universitata kursaroj en ĉiuj membroŝtatoj.

Ĉiuj ĉikoncernaj institucioj devas establi programojn kaj efektivajn respondojn kontraŭ lerneja tiranado den LGTTP+-homoj kaj kontraŭ seksismo.

11. Altigi la videblecon kaj dialogadon pri LGTTP+-temoj en la publika kampo, kaj pri la problemoj, kiujn defias genro kaj sekse diversaj homoj (aparte, je komunikado kun registaroj kaj oficialaj instancoj).

#### **4. Energio, Klimata ŝanĝiĝo kaj Agrikulturo**

La juna generacio devos pritrakti la sekvojn de la ekologiaj krizoj kiujn ni aktuale alfrontas. La granda rapideco laŭ kiu ni estas forkonsumantaj la naturon, malaperigas speciojn kaj poluas nian medion, devas esti haltigata. La forkonsumo de nia medio okazas ĉiutage en diversaj formoj, sed ĉi tiun diversecon da problemoj ne reflektas la EU-politikoj. Merkato-bazitaj kaj duon-koraj instrumentoj kiel la Eŭropa Merkato-Mekanismo pri Eligoj aŭ eligo-celoj ne sufiĉas por pritrakti la vastan gamon da ekologiaj problemoj nia socio alfrontas hodiaŭ. Malnovstilaj metodoj por produkti energion devas esti malpermesataj en Eŭropo kaj subvencioj por fosiliaj energio-fontoj kiel la atomenergio devas esti haltigataj. Ni devas produkti nian energion ene de la Eŭropa Unio en ekologia, sociala kaj loka maniero. Investante je renovigebla energio kaj evoluiganta eŭropa n energio-reton, verdaj laborpostenoj povas esti kreataj. Por minimumigi eligojn kaj por eviti danĝeran tutmondan varmiĝon, energia efikeco kaj reduktado de la konsumo de energio devus havi pli altan prioritaton en ekologia politiko de la EU.

La nuntempa komuna agrikultura politiko, ne estas daŭrebla. Reformoj devas esti koncentrataj al evoluo de pli etikaj kaj daŭreblaj produktado-metodoj. Ĉi tiuj inkluzivas pli da loke kaj organike produktata nutraĵo, kaj ankaŭ financoj por kulturaj projektoj. Vivkvalitorilataj projektoj por la kamparo, konservante naturajn pejzaĝojn kaj la faŭnon devus esti parto de la ĉefa fokuso kiam oni asignas subtenon por kamparanoj. Agrikulturaj fondusoj ne malutiligu al la vivo de bestoj aŭ de homoj ene de aŭ ekstere de la Eŭropa Unio. Eks-

cesa produktado signifas malŝparon de rimedoj kaj energio, sekve la konsumo kaj produktado de varoj devus esti adaptataj al la veraj bezonoj de la homoj kaj al la kapacito de la planedo.

### **Sekve FJEV postulas:**

1. Gvidi Eŭropon al 100%e renovigebla elektro -modelo ĝis 2030 por batali la klimatan ŝanĝiĝon, kaj certigi energio-sendependecon kaj memsufiĉecon kiel parto de la re-lokigo de la ekonomio. Aktiva subteno por malcentralizita energio-produktado kaj etaskala, komunume posedata generado de renovigebla energio, inkluzive komunan normon por la komercigo de etaskale produktata elektro. Kreo de Eŭropa Komunumo por Renovigebla Energio kaj Eŭrop-larĝa energio-reto por permesi la integron de altaj proporcioj da renovigeblaj energioj. Konverĝo-fondusoj kaj obligacioj de la Eŭropa Investobanko devus esti uzataj por financi la energiontransiron, kaj investi en verdaj teknologioj kaj esploro. Ĉesigi energio-generadon surbaze de fosiliaj brulaĵoj: malpermesi skistogaso-boradon kaj hidraŭlikan fendadon, kaj la ekstraktadon de nafto el asfalto-sabloj, finigi subvenciojn por ekstraktado da fosilia brulaĵo, importo kaj generado, fermi fosilio-brulaĵaj elektro-centraloj kaj malpermesi teknologiojn kiuj estas falsaj solvoj, kiel CCS (karbono-kaptado kaj -stokado) kaj atomara fuzioreaktoro. Aspiri kaj okupi konkretajn paŝojn al sen-atom-energia Eŭropo.

Tro da eŭropaj landoj ankoraŭ dependas je atomenergio. Ĉernobilo kaj Fukushima instruis nin kiel danĝere estas la komerca ekspluatado de la atomenergio. Ni bezonas vojmapon al stadie nuligado de atomenergio anstataŭ novaj subvencioj kaj pli liberalaj leĝoj pri la ekspluato de la atomenergio.

Antaŭenigi strukturan ŝanĝon de la produktado- kaj konsumado-sistemoj, prioritatigante sufiĉecon, energian efikecon kaj la redukton de absolutaj niveloj de energio konsumado, inkluzivante edukadon pri energio-uzado.

Redukti la energio-konsumon en de la EU je 50% por ĉiuj sektoroj kaj ĉiuj energio-tipoj ĝis 2040 rilate al la nivelo de 1990. Ĉi tiu rimedo inkluzivus agojn kiel deviga izoligo por ĉiu konstruaĵo, energia efikeco por hejmaj bezonoj kaj pliigo je la uzado de publika transportado.

Antaŭenigi varmo-reton por varmigi urbo-kernojn pere de de renovigeblaj energioj kiel biogaso, hidrogeno aŭ biomaso. Pliigi esploradon pri la tria generacio de renovigebla petrolo.

2. Evoluigi devigan EU-traktaton pri la klimata ŝanĝiĝo en 2015, kiu inkluzivas devigan eligoredukto-celon - komencante je 40% redukto inter la niveloj de 1990 ĝis 2020 - kaj inkluzivas la ne-traktitajn temojn en la EU-a Eligo-Komerco-Reguloj (ETS) tiel, ke agrikulturo, forstokulturo kaj alia aktuale ekskluditaj kampoj de la ekonomio estas inkluzivataj.

La nombro da eligo-permesoj en la ETS devus esti reduktata kaj ĉi tiuj devus ne esti asignataj senpage al firmaoj. Ekstere, la EU devus agi kiel tutmonda makleristo pri klimata ŝanĝiĝo kaj montri gvidantecon por internacie deviga traktato pri klimato-ŝanĝiĝo. Ĉi tiu internacia gvidanteco inkluzivus reformon de la internacia komerco-leĝaro pere de antaŭenigo de justa teknologio-transigo kaj la redukto de karbondioksidaj eligoj flanke de la ekonomio tutmonde.

3. La eligoj de forcejaj gasoj devas esti impostataj - minimumaj niveloj de impostoj devus esti fiksataj EU-nivele, sed al membroŝtatoj estu permesata altigi ĉi tiujn super la minimumo. Ĉi tiuj impostoj ne estus limigataj al transportado sed inkluzivus ĉiujn sektorojn.

4. La ekologia politiko de la EU devas esti deviga minimumo por ĉiuj membroŝtatoj. Aktivecoj malutilaj por la medio, inkluzivante eligojn da karbondioksido, devas esti kontraŭbatalataj de EU-vastaj impostoj, malpermesoj kaj regularo. Tiu devus esti efektivigata de eŭropa priekologia institucio kun la potenco sankcii ŝtatojn kaj firmaojn kiuj ne observas la regularon aŭ tribunalajn decidojn. Kohera kaj deviga ekologia politiko povus rezulti en EU kiu fariĝus videbla kaj kredinda motoro en la mondo pri ĉi tiu temo.

5. Protekton kaj rehabilitadon de la biodiverseco kaj habitatoj, kun aranĝoj kiuj inkluzivas:

la interkonekton de „Natura 2000“ areoj; pli grandan puŝon rezervi terenon por resovaĝigi kaj re-enkonduki malaperantajn speciojn kiuj estis ĉasitaj de homoj - kiel lupoj, kastoroj, aproj aŭ ursoj ktp.; kaj pagojn por ekologiaj servoj, kaj por mildigo klimata ŝanĝiĝo kaj la adapto-planoj kontraŭ ĝi.

6. Redukto kaj reformo de la agrikultura subvencio sistemo:

fini subvenciojn por fiŝkaptado, industriskala kultivado, agrikultura eksporto kaj alia subvencioj kiuj damaĝas al la malgrandaj kultivistoj en la Globala Sudo. Subvencioj devas esti redirektataj al malpli granda agrikulturado, al la konservo de naturaj pejzaĝoj, pli etikaj kaj daŭreblaj rimedoj de produktado, kiel organika kultivado kaj projektoj kiuj altigas la vivokvaliton por la kamparanoj kaj instigado al la junularo reveni al la kamparaj regionoj.

7. Kohera politiko pri la uzo de la kampoj por certigi nutraĵo-sekurecon, interalie evitante ke biofuelo konkurencas kontraŭ nutraĵo- kultivado, kaj malpermesante la senarbarigon kaj tereno-prenadon (maljusta aĉeto de kampoj) flanke de EU-membroŝtatoj aŭ firmaoj.

8. Deklari semojn komunaĵon kaj malpermesi DNA-patentigon pri ekzistantaj plantoj.

Malpermesi GMO-on en agrikulturo, inkluzivante etikedi produktojn de bestoj kiuj estis

nutritaj pere de GMO-plantoj. Ni devas certigi la plejeble altan travideblecon en la nutraĵo-industrio kaj plifortigi la rajtojn de konsumantoj.

9. Antaŭenigi vegetarismon, veganismon kaj preferi nutraĵo-provizojn el regiona, justa kaj laŭsezona produktado.

10. Antaŭenigi la respondecan konsumon de varoj kaj resursoj kaj aktivi kontraŭ konsumisma socio. Ni favoras socion kiu baziĝas sur kulturo, scio kaj servoj al homoj.

## **5. Migrado kaj libera moviĝo**

### Nek Landlimoj - Nek Deportado

Libera cirkulado estas baza homa rajto. Landlimoj kaj la efektivigo de striktaj landlimaj kontroloj estigas restriktajn al la rajto moviĝi. Tial FYEG kredas ke ĉiuj landlimoj devus esti forprenataj. Ni volas loĝi en mondo sen kontrolpunktoj, vizo-restriktoj kaj Frontex.

La Eŭropa Unio kreis spacon de libera moviĝo por siaj civitanoj. Tamen la originala spirito de la EU delonge malaperis. Por EU civitanoj kaj eĉ malpli por civitanoj el tria lando, la projekto ne plu entenas la promesojn iam donitaj. Male ĝi estas renversita kaj iĝas pli restriktaj por ĉiu. Ni devas reveni al la originalaj valoroj de solidara kaj malfermita Eŭropo.

Homoj estu ne alfrontataj al restriktaj por studi, labori kaj loĝi en aliaj landoj ol siaj hejmlandoj. Moviĝeblo ene de la EU devus esti malmultekosta, rapida, oportuna kaj ekologie pura. Migradon oni rigardu kiel riĉiĝanta kaj subtenanta, prefere ol endanĝeriganta la sociojn. FYEG postulas ke naturalizo kaj procedoj por duobla nacieco estu pli alireblaj kaj efikaj. Civitaneco devas ne esti ligita al nacieco, sed al la loĝloko. Ĝi devas inkluzivi la aliron al sociaj, socialaj, ekonomiaj kaj politikaj rajtoj. Politika partopreno estas kerna por pli socia kohereco, tial FYEG postulas la rajton voĉdoni por ĉiu loĝante en la EU, surbaze de la loĝloko.

La EU devas kontraŭbatali la perfortajn kaŭzojn de migrado pere de pli justa komerco-politiko, kaj pli bona evoluo-politiko. FYEG postulas azilo-reĝimon kiu meritas sian nomo. Ni bezonas fortan protekton por homoj kiuj fuĝ(ad)as pro milito, genocido, politika, religia aŭ iu ajn alia formo de severa diskriminacio, natur-katastrofojn kaj klimata ŝanĝiĝo, maldignaj vivkondiĉoj kaj ekonomia marĝenigo en ilia hejmlandaj socioj. Rifuĝintoj estu bonvenigataj ĉie. Ni akceptas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj laŭvorte kie ĝi deklaras ke „Ĉiu rajtas serĉi kaj bonfarti je azilo en aliaj landoj kontraŭ persekutado" (Artikolo 14/1) kaj kredas ka la eŭropaj socioj sin-devigis provizi protekton por tiuj, kiuj bezonas ĝin.

### **Sekve FYEG postulas:**

1. La totala malpermeso de tenejoj por migrintoj kaj enkarcerigo de individuoj sole pro migradorilataj kialoj. Deporto de migrintoj ne devas okazi.

2. Ni defias la koncepton de asimiliĝo, kiu implicas la postulon por migrintoj adapti sin al jam ekzistanta kaj neŝanĝebla socio, kaj miksiĝi kun la reganta kulturo.

La konceptoj de inkluzivo kaj plurismo devas esti adoptataj. La celo devas esti daŭranta dialogo inter diversaj vivmanieroj por komune eltrovi kiel ni povas vivi kune kaj akcepti diversecon.

Kultura, historia kaj **lingva diverseco** devas esti subtenata, la rajtoj de naciaj malplimultoj devas esti defendataj kaj interkultura dialogo kaj reciproka kompreno devas esti plifortigata. La socia kaj kultura apartigo de niaj socioj devas malaperi.

3. Libera cirkulado estas homa rajto kaj devas esti respektata, ene de Eŭropo, je ties landlimoj kaj ekstere. La EU devas esti bonveniga kaj amikeca loko. Ni povas havi nek landliman politikon nek nedemokratiajn, netravideblajn instituciojn kiuj malobservas la rajtojn de migrantoj kaj rifuĝantoj kiel estas FRONTEX. Kiel unua paŝo, vizo-postuloj por ne-EU-landoj devus esti forprenataj. Ene de la EU, la Schengen-Traktato devas esti plilarĝigata, kaj ni devas rezisti al provoj kiuj diluos (malfortigos) ĝin kaj reinstalos internajn landlimajn kontrolojn. Nia longdaŭra celo estas monda civitaneco.

La daŭranta militisteca instalado je la landlimoj en la EU kaj ankaŭ la vastigo de landlimaj kontrol-aktivecoj al la maro kaj la teritorio de triaj landoj devas haltiĝi. EUROSUR provas triki densan reton de gvatado je la tuta EU-landlima regiono uzante teknologion "laŭstate de la arto"; la iniciativo por "Inteligentaj Landlimoj" registrus ĉiujn eniroj kaj elirojn de landaj civitanoj pere de elektronika sistemo. Ĉi tiuj projektoj endanĝerigas la rajtojn de ĉiuj migrantoj kaj EU-civitanoj. Iu ajn "limo-administra" sistemo devas havi kiel ĝia ĉefa utilo la savon kaj protekton de migrantoj kaj ne la malhelpon de "neleĝa migrado".

4. Ĉar la EU kontribuas grave al ekologiaj kaj la ekonomiaj kondiĉoj kiuj devigas homojn en la Globala Sudo al migrado, ĝi havas la respondecon rekonsideri ĉiujn siajn politikojn. Sekve la EU devas tutmonde peni por efektivig pli bonajn socialajn kaj ekologiajn regulojn. Unu opcio estus la enkonduko de socialaj kaj ekologiaj impostoj je la komercaj landlimoj de la EU.

5. La EU devas havi respondecan azilopolitikon.

Ĝis ĉi tiu estos atingita, oni ne rajtas revenigi la malakceptitajn azilopetantojn al ilia patrujo, se estas iu risko de malhumana traktado. Dignaj vivkondiĉoj por azilopetantoj devas esti certigataj. La EU devas establi komunan azilo-aŭtoritaton kaj novan azilosistemon

surbaze de solidareco kiu komune portas la respondecon inter EU membro-ŝtatoj; kaj devas abolici la Traktaton de Dublino. Politika azilo devas esti certigata.

6. La EU devas akcepti ĉiujn azilo-serĉantajn rifuĝintojn el konflikto-areoj kiel Sirio, kaj pliigi la ampleksojn de "legitimaj" kialoj pro kiuj rifuĝintoj estas rajtigitaj fuĝi el siaj landoj, kiuj inkluzivas - inter alie - ekonomiajn, ekologiajn kaj klimatajn malfacilaĵojn. La EU ne rajtas unuflanke vendi armilojn kio kaŭzas rifuĝintojn pro krizoj kaj aliflanke fermi la landlimon al ili.

7. La EU devas certigi ke bazaj rajtoj estas egale fortigitaj por ĉiuj homoj loĝante en la EU, ĉu migrintoj aŭ civitanoj de membroŝtatoj. Ekonomiaj konsideroj ne devus regi migrado-politikon.

8. Loĝado-permesoj devas esti libere kaj facile atingeblaj.

9. Plifortigi kaj instigi por la junularo kaj la laboristaro moviĝeblo-programojn kaj moviĝeblo-partnerecojn, interalie kun triaj landoj, ĉar ĝi helpas plifortigi eŭropan konscion kaj solidarecon, kaj subtenas interkulturan lernadon. Administraciaj baroj devus esti forprenataj.

[www.FYEG.org](http://www.FYEG.org)

-----

**Glosaro:** (English original = Esperanto)

Biofuel = biofuelo, fakte temas pri etanolo el sukerkano ktp. aŭ biodizelo, el plantaj oleoj, ankaŭ post la uzado en kuirejoj

FYEG, Federation of Young European Greens = FJEV, Federacio de Junaj Eŭropaj Verduloj

European Emissions Trading Scheme = Eŭropa Merkato-Mekanismo pri Eligoj

Decarbonisation = redukto de karbondioksidadaj eligoj

Land grabbing = tereno-prenado (grandaj konzernoj aŭvide aĉetas terenojn)

GMO = genetike modifita organismo

empowerment = ebleco por rajtiĝado

**Tradukita** el la angla de AVE (Manfred, Leo, Wolfgang; korektita de Herman ):

Asocio de Verduloj Esperantistaj: [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)